sub la suda kruco ★

ESPERANTO



THE FILMKONKURSO

The all-Esperanto Film Competition
La tuta Esperanto-filmkonkurso



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 20 [2] numero 110 junio 2012

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Šandor Monostori, Kam Lee, kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15 de aŭgusto 2012

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2012 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 1038-9380

Sur la kovrilo: Supre, esplorado man-en-mane tra la disfalintaj konstruaĵoj de Salakva Rivero (Saltwater River). Malsupre: La Esperanto-filmkonkurso.

Sur la malantaŭa kovrilo: Bankedo dum la Jubilea Kongreso, Adelajdo, 2011.

Ĉu vi volas ŝpari monon vojaĝante? 5


Teruraj tertremoj en Christchurch 7


La Lasta Kunsido 13


La Filmkonkurso 18


Ĉiuj volas lerni! 19


Libroj, E-arĥivoj, kaj Kolektoj 21


Arthur Oliver Centjara 23


Vizito al la Ruinoj de Salakva Rivero 24


Kongresa Balalajka Koncerto 26


Momentoj el la jubilea bankedo 27

Junio, du mil dekdu

Enkonduko

En januaro mi vizitis kelkajn landojn en Eŭropo kun mia familio. Kiel kutime, ni profitis la okazon por renkonti esperantistojn.

Tre interesa por mi estis vizito al la regiono de Tipperary en Irlando, de kie miaj prauloj migris al Nov-Zelando antaŭ iom pli ol 100 jaroj. Mia familia nomo, Ryan, aperas ĉie – en trinkejoj, butikoj, trinkejoj, stratnomoj, trinkejoj, trinkejoj ktp! Revenante hejmen al Nov-Zelando, mi legis en tagĵurnalo ke oni reklamas en Irlando por venigi konstruistojn al Nov-Zelando por helpi en la rekonstruado de Christchurch post la teruraj tertremoj. Tiu estas bona ideo ĉar nuntempe en Irlando estas multaj senlaboraj konstruistoj pro la grava financa krizo. Samtempe, mi legis ke oni reklamas en tagĵurnaloj por venigi soldatojn kaj policistojn al Nov-Zelando pro la fakto ke mankas homoj por tiuj postenoj ĉi tie.

Mi demandis min kial oni volas venigi homojn el anglalingvaj landoj. Certe estas avantaĝe esti denaska parolanto de la angla lingvo en ĉi tiu mondparto, sed ĉu lertaj konstruistoj el alilingvaj landoj ne povas fari la saman laboron? Ĉu nur denaska anglalingva konstruisto povas uzi martelon? Mi ĉiam legas artikolojn aŭ vidas televidprogramojn en kiuj oni parolas pri ‘la mondo’. Ekzemple, oni diras ke X kantisto aŭ Y verkisto estas la plej bona ‘de la tuta mondo’, sed tiuj uloj estas preskaŭ ĉiam britoj aŭ usonanoj.

Lastatempe la revuo *People* diras ke Beyonce (usona kantistino) estas la plej bela virino de la tuta mondo. Mi kredas ke, por ni, la mondo estas nur la anglalingva mondo ĉar ni ne komprenas kio okazas ekster niaj lingvaj ‘landlimoj’. Ĉu ne eblas ke kantisto el Ĉinio aŭ verkisto el Francio povas esti la plej bona de la tuta mondo? Ĉu ne eblas ke virino el Islando estas la plej bela?

Pro tio, mi ĝojas esti esperantisto ĉar Esperanto malfermas por mi pli grandan mondon. Ĉiumonate mi legas artikolojn en *Monato* pri Albanio, pasintmonate mi renkontis esperantistan vizitanton el Aŭstrio, mi vespermanĝis en januaro kun esperantistoj en Italio, kaj antaŭnelonge mi parolis per Skajpo kun esperantisto en Litovio. Kiu en Nov-Zelando aŭ Aŭstralio scias multon pri tiuj foraj landoj? Por ni, esperantistoj, nia mondo estas vere tutmonda.

David Ryan

Ĉu la flughaveno en Christchurch baldaŭ havos indikilojn en la irlanda lingvo?



Ĉu vi volas ŝpari monon vojaĝante?

David Ryan

Kiam mi planas vojaĝon kun mia familio, mi ne vizitas vojaĝagentejon. Mi ege ŝatas pasigi multajn horojn antaŭ mia komputilo por mendi miajn flugojn kaj por ŝpari monon. Mi serĉas ĉiajn flugeblecojn kaj rekomendojn pri hoteloj. Se vi ankaŭ ŝatas fari tion (se vi havas multan liberan tempon), mi prezentas ĉi tie kelkajn konsilojn (ĉi tiu estas ĝisdatigo de artikolo kiu aperis en ESK antaŭ kelkaj jaroj).

Flugoj al Londono: Miloj da aŭstralianoj kaj nov-zelandanoj vizitas Londonon ĉiujare. La kutima, plej ofta vojo al Londono estas per Air New Zealand aŭ Qantas rekte al Londono (Heathrow) kun halto en Nord-Ameriko aŭ Azio. Pro kialoj kiujn mi tute ne komprenas, tiuj flugoj al Londono kaj aliaj urboj en Britio kaj Irlando kostas multe pli ol flugoj al aliaj eŭropaj urboj. Ĉu vi nepre devas iri rekte al Londono? Serĉu flugojn al Parizo kaj ekde tie iru en trajno (Eurostar), aŭ flugu al preskaŭ iu ajn alia eŭropa urbo kaj flugu ekde tie al Londono per malmultkosta flugkompanio ('low-cost airline' en angla).

Ne pensu nur pri Air New Zealand kaj Qantas. Se vi intencas vojaĝi al Eŭropo, multaj aliaj eŭropaj flugkompanioj havas rilatojn kun aziaj flugkompanioj. Tial, flugu el Nov-Zelando aŭ Aŭstralio al azia urbo per azia flugkompanio kaj prenu aviadilon de eŭropa flugkompanio al Romo, Vieno, Prago, Amsterdamo, Kopenhago ktp.

Esploru ĉiujn eblecojn: Vidu la retpaĝaron de flughaveno al kiu vi volas flugi kaj tie vi plej verŝajne trovos liston de ĉiuj kompanioj kiuj flugas al tiu flughaveno. Ekzemple, se vi volas iri de Sidnejo al Bostono, ne estas rekta flugo. Necesas fari halton en la okcidenta marbordo de Usono aŭ Kanado. Ekde tie estas pli ol cent flugeblecoj por atingi Bostonon.

Retpaĝaroj: Per kelkaj retpaĝaroj eblas serĉi diversajn flugkompaniojn samtempe; tio ŝparos tempon por vi. Tamen, tiaj retpaĝaroj ofte donas la pli facilan rezulton per la plej oftaj flugkompanioj (Air New Zealand, Qantas, Emirates, Singapore Airlines ktp) sed ili ne donas ĉiujn eblajn rezultojn. Kelkfoje vi devas fari novan serĉon kaj elekti specifan flugkompanion. Kelkaj retpaĝaroj donas rezultojn uzante nur unu flugkompanio por la tuta flugo. Konsideru ĉu kostas malpli elekti du flugkompaniojn por via flugo. Ekzemple, mendu flugon per flugkompanio A ĝis Hongkongo kaj per flugkompanio B ekde tie al Eŭropo. Tamen, atentu! Se vi alvenos malfrue al Hongkongo per flugkompanio A kaj maltrafos vian flugon per flugkompanio B, vi havos gravan problemon! Nepre aĉetu vojaĝasekuron.

Malmultkostaj flugkompanioj: Kelkaj tiaj flugkompanioj estas evitendaj pro malbona servo aŭ la fakto ke ili flugas al malgrandaj flughavenoj ekde kie vi devos iri al via celata urbo en aŭtobuso aŭ trajno. Ĉu tio finfine kostos malpli? Tamen, aliaj

malmultkostaj flugkompanioj estas ege bonaj kaj ili kostas malpli nur ĉar via kafo kaj sandviĉo ne estas senpagaj aŭ ĉar vi devas pagi pli por viaj valizoj. Se vi vere ne volas manĝi aŭ se vi ne vojaĝas kun multaj valizoj aŭ se vi ne volas vidi filmon en aviadilo, malmultkostaj flugkompanioj estas ege taŭgaj. Kelkfoje ili estas eĉ pli bonaj ol plenkostaj aviadiloj. Ĉi-jare kiam ni vizitis Eŭropon, ni vojaĝis per malmultkosta flugkompanio kun sendrata interreta aliro en la aviadilo!

Aldonaj kostaj: Eble vi trovas nekredeblan malmultkostan flugprezon. Atentu! Kiam vi decidas konfirmi vian mendon, vi eble devos pagi pli por porti valizon, se vi volas mendi sidlokon apud fenestro, por 'administraj kostoj', aŭ se vi volas pagi per kreditkarto. Male, aliaj flugkompanioj proponas unu prezon sen tiuj aldonaĵoj. Tial, atentu kiam vi faras komparojn inter flugprezoj.

Hoteloj: Tripadvisor.com estas tre utila retpaĝaro kie vi trovos komentojn pri hoteloj far homoj kiuj jam tranoktis tie. Ofte vi ankaŭ vidos fotojn. Ne temas pri propagandado de la hotelo mem sed 'veraj' komentoj, opinioj, kaj rekomendoj. Tiaj komentoj utilas por scii ĉu la hotelo situas proksima al stacidomo aŭ McDonalds aŭ ĉu la sendrata interreta aliro en la hotelo estas multekosta. Se multaj komentoj donas la saman opinion, ili ĝenerale povas esti fidindaj. Tamen, eble vi trovos malfavoran komenton – ĉar la senskrupula estro de najbara hotelo faras mensogan komenton. Kelkaj komentoj ridigas min. Ekzemple, iu plendas kaj faras malfavoran komenton ĉar stabanoj en hotelo ne bone parolas anglan, aŭ la hotela televido ne havas CNN aŭ BBC.

Uzu Esperanton: Mi ofte trovas hotelon kiu ŝajne estas taŭga. Tamen, mi ne ĉiam scias ĉu la kvartalo kie ĝi troviĝas estas trankvila aŭ sendanĝera. Pro tio, mi jam skribis kelkfoje al delegitoj de UEA (mi trovas iliajn nomojn en la jarlibro) por fari simplan demandon. Dank'al ili, mi scias ĉu hotelo estas taŭga.

Vojaĝi kun infanoj: Se vi vojaĝas kun infano, alportu iPad-on aŭ iPod-on por ke via infano ĝoje ludu dum flugo aŭ en flughaveno aŭ hotelo. Tamen, se vi vojaĝas kun pli ol unu infano, pli ol unu iPad-o necesas. Se ne, viaj infanoj volos uzi vian iPad-on samtempe kaj ĉiamaj bataloj kaj krioj ĝenos vin dum via feria vojaĝo!

Por fari malmultkostajn telefonvokojn: Estas ofte tro multekoste uzi vian nov-zelandan aŭ aŭstralian poŝtelefonon por fari vokojn eksterlande. Same, uzi vian hotelan telefonon ankaŭ povas tro kosti. Tial, portu vian iPad-on aŭ porteblan komputilon, aldonu kelkajn eŭrojn al via Skajp-konto, kaj vi povos fari telefonvokojn per Skajpo je kosto de nur kelkaj cendoj por ĉiu minuto.



Teruraj tertremoj en Christchurch

Erin McGifford (prelego dum la kongreso de NZEA en januaro 2012)

Lastan jaron dum la kongreso en Wellington, mi parolis pri la granda tertremo en Canterbury [provinco kies ĉefurbo estas Christchurch] de la 4-a de septembro 2010. Mi certe ne imagis ke dum la 2012a kongreso en Rotorua mi parolos pri multe pli grava tertremo en Christchurch, tiu de la 22-a de februaro 2011.

Fakte estis bonŝance ke la septembra tertremo okazis unue. Tiu tertremo okazis en la mezo de la nokto. Ni estis sekuraj en niaj litoj kaj preskaŭ neniu vundiĝis. Ni lernis multon pri kiel trakti tertremojn kaj rompitajn instalaĵojn, kaj ni estis multe pli preparitaj kiam la februara tertremo venis.

Inter februaro 2011 kaj nun [januaro 2012] okazis pli ol 9 000 pliaj tertremoj. Du estis pli grandaj ol 6 je la skalo de Richter (junio kaj decembro 2011) kaj kaŭzis signifan novan detruon. Nun ni scivolas ĉu pliaj grandegaj tertremoj okazos antaŭ ol la serio finiĝos.

Tamen, mi deziras hodiaŭ precipe paroli pri la februara tertremo. Kiel vi scias, 181 homoj mortis en tiu tertremo, la plimulto en unu konstruaĵo. Multaj aliaj konstruaĵoj ankaŭ detruiĝis. Hodiaŭ mi precipe parolos pri tio kio okazis en unu domo - mia hejmo.

Tamen, unue mi diru ke en diversaj partoj de Christchurch oni spertis la tertremon tre malsame. Ekzemple, en la nord-okcidenta parto de la urbego la plejmulto sentis iom da skuado kaj tio estis ĉio. En la orienta parto de la urbego multaj suferis multon. Muroj kaj eĉ tutaj domoj forfalis. La stratoj estis inunditaj per akvo kaj sablo. Grandaj fendoj tranĉis la vojojn. En aliaj lokoj oni spertis miksaĵon de problemoj. Mia domo estas en mezgrada situacio.

Do, je tiu historia tago en februaro mi bildigu min: mi ripozas en mia brakseĝo en la sidĉambro post mia lunĉo. Subite tertremo eruptas - abrupta skuo, kaj poste energia ŝancelado. Post ĉiu skuo, pli da objektoj falas, kaj pli da eroj saltas de sur la mebloj. La radio-programo abrupte ĉesas.

Malglataj sonoj tumultas - klakado, kaj molaj bruoj kiam grandaj objektoj atingas la plankon. La skuoj iĝas pli kaj pli fortaj, kaj mi timetas. Ŝajnas kvazaŭ monstra besto provas forŝiri, dispecigi la domon. Mi flaras polvon. Tio timetigas min: ĉu la traboj de la tegmento nun disiĝas?

La skuado tiom perfortas ke mi decidas ne eliri de mia seĝo, kvankam mi estas nervoza pro la granda fenestro tuj malantaŭ mi kaj la tegmenta fenestro super mi. Sed la muroj kaj plafono nur mallaŭte knaras. Ŝajnas ke la domo flekse ŝanceliĝas harmonie kun la tertremo.

La tertremo ĉesas, post proksimume dekok sekundoj, sed la domo daŭre ŝanceliĝas dum kelkaj sekundoj - sekundoj kiuj ŝajne daŭras multe pli longan tempon. Mi ekstaras kaj iras al la kuireja pordo. Survoje mi devas grimpi super objektoj kiuj falis sur la plankon. Ho! Mi ne povas malfermi la pordon. La tertremo forte fermigis kaj ŝtopis ĝin. La aliaj du pordoj por eliri la ĉambron malfermas nur iomete - objektoj falis malantaŭ ili.

Mi deziras eliri de la domo - mi ne volas esti kaptita en ĝi. Kio okazos se la domo kolapsos, aŭ fajro komencos, aŭ pli granda tertremo

venos? Mi deziras eniri mian kuirejon - mia martelo kaj aliaj iloj estas tie. Kun ili mi povos devigi la pordon malfermi. Mi deziras vidi tion kio okazas ekster la domo.

Mi vidas tra la fenestro en la kuireja pordo ke la pordo de la fridujo malfermiĝis. La elektra povo ĉesis kiam la tertremo okazis, kaj la grava malvarmeco kiu restas nun eskapas. Mi aŭdas fluantan akvon en la banĉambro. Tio tre ĝenas min. Ĉu tubo rompiĝis - aŭ la necesejo? Ĉu la akvo inundos la domon? Post duon-minuto ĝi haltas, sed post plua tertremo dek-kvin minutojn poste ĝi rekomencas - sed baldaŭ haltas denove.

Mi movas kelkajn el la objektoj kiuj falis en la sidĉambro por atingi malfermeblan fenestron. Mi grimpas malgrandan ŝtuparon kaj eliras fenestron. La piedvojo inter la strato kaj la domo aspektas kiel rivereto - akvo kaj fajna griza sablo fluas laŭ ĝi. Mi paŝas sur la gazono por atingi la vojon sen droni miajn ŝuojn.

Mi aŭdas najbarojn proksime; tial, mi grimpas super mia ĉe-strata barilo. La strato estas kiel labirinto - mi zorge paŝas inter lagetoj, malseka sablo, fendetoj, kaj levitaj kaj mallevitaj pecoj de la piedvojo - por kunveni kun miaj najbaroj. Ili estas bonhumoraj. Ili diras ke la tetremo havis grandecon de 6,3 laŭ la skalo de Richter, kaj ke la epicentro estis ĉe dek kilometroj sude de Christchurch.

Mia najbaro, Sean, havas sangon sur la vizaĝo. “Briko falis sur min” li diras. “La briko rompiĝis - sed mi estas bonstata.” La brika muro kiu ŝirmas kontraŭ fajro falis de lia domo. Nun, duono de liaj ĉambroj estas malkaŝitaj al preterpasantoj. Alia najbaro, Christine, diras “Mi ĉiam scivolis kiel aspektas la interno de via domo - kaj nun mi scias”. Ili ambaŭ ridegas. Poste, Anita, la edzino de Sean, diras al mi ke ŝi estis for kiam la tertremo okazis. Kutime je tiu horo ŝi dormetas sur la sofo apud tiu muro kiu nun kolapsis. Do, pro bonŝanco ŝi eskapis vundigon aŭ eĉ mortigon.

Mi revenas al mia hejmo. Mi trovas kelkajn longajn pecojn de ligno malantaŭ la aŭtomobilejo kaj metas ilin laŭ la piedvojo por povi piediri sur ili sen malsekigi miajn ŝuojn.

Mi provas malfermi la eksteran kuirejan pordon sed malsukcesas. Mi iras por kontroli la malantaŭan gazonon. Domaĝe! La brika kontraŭ-fajro-muro de la najbara domo kolapsis. Inter niaj du domoj estas mallarĝa spaco de nur du futoj (proksimume 60 cm). Nun ĉi tiu spaco pleniĝis kun brikoj, ligno, kaj pezaj pecoj de betono ĝis la alteco de kvin futoj (proksimume 1,5 metroj). Brikoj ankaŭ falis sur mian tegmenton apud mia tegmenta fenestro. Du brikoj eĉ falis sur la fenestron - bonŝance la vitro estas fortigita kaj ne rompiĝis. Aliaj

Bildo 1: *Anglikana katedralo*



brikoj falis sur mian gazonon kaj ĝardenon. Mi malkovros poste ke granda peco de betono rompis mian kloako-tubon. Brikoj eĉ rompis la grandan fenestron de la sidĉambro, kaj la fenestron de la banĉambro.

Jen surprizo por mi: dum la tertremo mi sidis en la sidĉambro je la alia flanko de tiu fenestro, sed mi ne aŭdis la brikojn kiuj falis sur la tegmenton, aŭ la rompon de la fenestroj. Ŝajne, la vido de falantaj objektoj kaptis mian atenton. La tertremo daŭris tre mallonge kaj mi ne havis tempon por distingi inter la diversaj sonoj. Ankaŭ mi sentis nur la skuadon de flanko al flanko kaj ne la supren-kaj-suben skuadon.

Poste mi aŭdis ke la grundo rapide leviĝis kaj falis pli ol unu metron. La konstruaĵoj sur tiu grundo ankaŭ leviĝis kaj poste falis - kaj koliziis kun la grundo kiu denove leviĝis. Do, duobla bato frapis la konstruaĵojn. Kelkaj homoj kiuj promenis sur la strato dum la tertremo estis ĵetitaj al la tero pro la forta skuado.

Mi movas brikojn por alproksimiĝi al la banĉambra fenestro. Mi grimpas en la fenestron, kaj elprenas martelon kaj aliajn ilojn de la kuirejo. Mi uzas ilin por devigi ke la malantaŭa pordo de la domo malfermu. Tamen, nun ĝi ne refermas. La tuta pordo malleviĝis, kaj la lango de la seruro ne plu iras en sian truon.

Mi memoras ke tuj post la tertremo mi aŭdis fluantan akvon. Do, kie ĝi estas? Sur la planko en la banĉambro tute ne estas akvo. Estas multaj aliaj objektoj kiuj falis el bretoj, sed ne akvo. Mistero! Poste mi trovis la akvon - sub la domo. Akvo kaj sablo spruĉis el la grundo tie, kaj faris lageton. Mi rigardas la ŝtopitan pordon inter la kuirejo kaj la sidĉambro. Hmm - ŝajnas ke la problemo estas sur la alia flanko. Por la tria fojo hodiaŭ mi grimpas tra fenestro - ĉifoje la sidĉambra fenestro. Mi martelas la pordon kaj fine malfermas ĝin. Bedaŭrinde ĝi ne plu volas fermiĝi. Fakte, estas utile ke la falantaj brikoj rompis du fenestrojn, ĉar per ili mi povis eniri mian domon spite la ŝtopitajn pordojn.

Kiam mi haltas momente kaj pensas pri la situacio mi sentas etan tremon en mi mem - la ŝoko mi supozas. Sed precipe mi sentas adrenalinon - estas tiom por fari, kaj mi forte deziras fari ĝin. Kaj mi estas feliĉa ke mi travivivis tiom grandan tertremon sen pli grandaj problemoj.

Mi pripensas mian tegmenton. La amaso de brikoj kaj pecoj de betono sur la tegmento estas tre peza. Mi timas ke ĝi difektos la tegmenton, aŭ falos tra la tegmenta fenestro. Eble ĝi jam difektis la tegmenton. Mi uzas ŝtuparon por grimpi sur la tegmenton. Jes, povas esti danĝere por mi se alia tertremo okazas dum mi estas sur la tegmento. Tamen, mi devas forigi tiujn brikojn!

Bildo 2: *Katolika katedralo*



Mi ĵetas la brikojn sur la gazonon. Kelkaj estas ligitaj al aliaj brikoj - mi batas ilin por disigi ilin. Mi ankaŭ devas bati la grandajn pecojn de betono por rompi ilin en pli malgrandajn pecojn. Estas multa mortera polvo sur la tegmento - jen tio kion mi flaris dum la tertremo. Finfine ĉio estas sur la tero. Mi trovas ke la tegmento iomete kurbiĝis kaj enfalis pro la pezo de la brikoj. La farbo estas gratita, kaj estas kelkaj etaj truoj. Sed mi multe trankviliĝas pro la forigo de la brikoj de sur la tegmento.

Kaj kiam plua granda tertremo de 5,9 okazas je 2.50 ptm mi jam grimpis malalten ĝis la tero … Multaj tertremoj okazas hodiaŭ - de post la ĉefa tertremo en la mezo de la tago ĝis la fino de la nokto ni travivas 44 tertremojn de grandeco 4 – 4,9, kaj kvar de inter 5 – 5,9.

Mi nun kontrolas la aliajn difektojn rilate al mia domo kaj terpeco. Sablo kaj akvo ŝprucis el la grundo en diversaj lokoj - el la gazono, el la piedvojoj, kaj sub la domo. Miaj betonaj piedvojoj estis rompitaj per 9 aŭ 10 fendetoj larĝaj je kelkaj cm. La strato nun estas je 13 centimetroj pli alta ol mia terpeco. Nun estas spacoj inter mia domo kaj la betona korto, kaj inter la kuirejo kaj la sidĉambro. Multaj metalaj bretaroj nun tordiĝas aŭ falas.

Partoj de mia terpeco nun klinetiĝas en diversaj direktoj. Kiam oni staras tie oni sentas iomete malekvilibra. Plej grave estas ke unu angulo de la domo nun malaltiĝis iomete (eble nur 5-10 centimetroj) kaj tio streĉas la tutan domon. Ĝi kaŭzas fendetojn en la muroj kaj plafono; kaj kelkaj pordoj nun ne bone funkcias. Mi ne havas elektran povon aŭ akvon, kaj la necesejo ne funkcias. Feliĉe la puto ankoraŭ funkcias - sed mi ne scias ĉu la akvo estas pura. Mia dratkonekta telefono funkcias, sed ne la aldonaj aparatoj aŭ mia respondo-maŝino.

Kiam krepuskas mi lumigas kandelojn, unu en la kuirejo kaj unu en la sidĉambro. Estas pli hejmece kaj komforte kiam oni povas vidi lumon en alia ĉambro, ne nur unusolan lumo-punkton en tute malluma domo. Mi timetas ke plia tertremo povos ĵeti la kandelojn suben kaj



Bildo 3: *Kuirejo (tra la fenestro en la pordo)*



Bildo 4: *La piedvojo ekster mia domo - kovrita de sablo, akvo, ktp*

Bildo 5: *La brika muro forfalis de la domo de mia najbaro Sean.*



kaŭzi fajron; tial, mi metas la kuirejan kandelon sur la forno, kaj metas la sidĉambran kandelon sur la tablo kaj sidas apud ĝi.

Mi manĝas malvarman manĝaĵon el du ladskatoloj: fiŝo kaj tomatoj; kaj mi trinkas zingibran bieron. Kvankam mi energie laboris dum kelkaj horoj mi ne multe malsatas - mi supozas ke adrenalino subtenas min.

Mi ne havas televidilon, komputilon, aŭ interreton, sed mi havas etan porteblan radion (mia elektra kompanio disdonis ĝin post la septembra tertremo). Mi ne volas elĉerpi la baterion, do mi ŝaltas ĝin nur de tempo al tempo. Mi enlitiĝas pli frue ol kutime, kaj dormas bone.

Post la tertremo la Instanco pri Naturaj Krizoj (Civil Defence) instrukciis nin fosi necesejon en niaj ĝardenoj, ĉar la kloaka sistemo rompiĝis. La mezo de Christchurch estis grave difektita pro la tertremo. Oni nomis ĝin la Ruĝan Zonon kaj konstruis barilon ĉirkaŭ ĝi. Soldatoj kaj policanoj gardis ĝin. Mia domo estis en tiu ruĝa zono. Mia loka butikaro havis naŭ butikojn antaŭ la tertremo, kaj sep ruiniĝis. Mi povis eliri por viziti aliajn butikojn ktp, sed kiam mi deziris reeniri mi devis montri dokumentojn kiuj pruvas mian nomon kaj adreson. Mi devis reveni hejmen antaŭ la sesa vespere.

Kvar tagojn post la tertremo oni inspektis mian domon. Oni vidis la grandan amason da brikoj kiuj premis kontraŭ unu muro - eble ok tunoj - kaj decidis ke ĝi danĝere minacas mian domon. Oni donis al mia domo ruĝan afiŝon. Tio signifas ke mi ne plu rajtas loĝi en mia domo. Tio estis granda ŝoko al mi. Amikinoj gastigis min dum kelkaj tagoj. Mi revenis al mia domo ĉiutage kaj movis brikojn. Mi timis eniri tiun mallarĝan spacon inter la du domoj, sed mi devis forigi tiujn brikojn!

Mi multe laboris kaj forigis centojn da brikoj. Post kelkaj tagoj alia inspektoro rigardis la restaĵon kaj forprenis mian aĉan ruĝan afiŝon. Mi rajtis denove loĝi en mia hejmo! Mi estis



Bildo 6: *La brika muro sur la domo de mia najbaro - antaŭ la tertremo*

Bildo 7: *La brika muro forfalis de la domo de mia najbaro sur mian tegmenton. La brika muro forfalis de la domo de mia najbaro sur miajn gazonon kaj fenestrojn.*



treege feliĉa, kvankam mi ankoraŭ ne havis elektran povon, aŭ akvon, aŭ necesejon.

Iom post iom oni restarigis aferojn: elektran povon post 11 tagoj, malgrandigon de la ruĝa zono, liveradon de poŝtaĵoj, starigon de surstrata necesejo (13 tagoj), rekonekton de mia komputilo kaj interreto (21 tagoj), kaj riparon de mia akvo-tubo (30 tagoj). Boligo de akvo ĉesis post 46 tagoj. Mi ankoraŭ (januaro 2012) devas uzi la publikan surstratan necesejon, ĉar la tuboj inter mia necesejo kaj la kloako sub la strato difektiĝis; kaj mi havas nur malvarman akvon.

Post la tertremo oni dividis la tutan urbon en zonojn laŭ la stabileco de la grundo. Se bona, oni estas en la verda zono. Se malbona, oni estas en la ruĝa zono. Mia distrikto estas en la oranĝa zono. La grundo suferis multajn difektojn sed la inĝenieroj volas plu esplori la situacion. Se oni metos mian domon en la verdan zonon mi povos ripari ĝin kaj daŭre loĝi en ĝi. Se ruĝa, la registaro aĉetos mian domon laŭ valoro de 2007 kaj detruos ĝin, kaj mi devos aĉeti alian domon en alia parto de la urbo. Do, mi atendas.




Bildo 8: *Sablo-vulkanoj*



Bildo 9: *Fendetoj inter la vojo kaj mia domo*

Rimarko de la redaktoro: Post kiam Erin verkis ĉi tiun artikolon, oni informis ŝin ke ŝia domo estas nun oficiale 'ruĝa'. Bonŝance, Erin aĉetis novan domon en alia parto de Christchurch kien ŝi translokiĝos en junio 2012.

Bildo 10: *Ruĝa afiŝo: 'Danĝero: ne eniru aŭ enloĝu'.*



Bildo 11: *Metalaj bretaroj tordiĝis.*



La Lasta Kunsido

Trevor Steele

Rolantoj:
- pluraj virinoj (Fratino A, Fratino B, ktp.)
- pluraj viroj (Frato Z, Frato V, ktp.)

Ĉiuj estas vestitaj nigre kaj aspektas iel anarĥiiste. Ĉiuj sidas en duoncirklo, bone videblaj al la spektantoj. Frato Z komence paŝas nervoze tien kaj reen. Ĉiuj atendas ke li ekparolu.

Frato Z: *(al iu nevidebla homo fone de la scenejo)* Ĉu ĉiuj pordoj estas ŝlositaj? Ĉu vi bone kontrolis ke ne estu mikrofonetoj en la ĉambro?

[Frato Z kapjesas, kontenta pro la gestoj de la nevidebla alia.]

Frato Z: Gefratoj, mi ĝojas ke vi povis veni al nia kunsido. Sed ĉu vi estas certaj ke neniu de la alia flanko vidis vin veni ĉi tien?

[Ĉiuj kapneas aŭ alimaniere indikas ke ilia ĉeesto estas sekreta.]

Frato Z: Tiu ĉi kunsido estas la lasta, antaŭ ol ni ekagos por savi la mondon.

[Aprobaj murmuroj de la ceteraj]

Frato Z: Ni manifestaciis miloble mil fojojn, ni sendis milionojn da retmesaĝoj al la instancoj kaj registaroj, sed ili ne reagis. Gefratoj, se la potenculoj ne agos por savi nian planedon, estas nia devo fari tion.

[Aprobaj murmuroj]

Frato Z: Nia planedo estas en akuta danĝero se ni ne tuj agos. Kaj mi venigis vin, ĉar vi estas la plej elstaraj aktivuloj sur pluraj kampoj. La danĝeroj al la planedo fontas ne nur el nia rekta detruado de la natura medio; ili estas ankaŭ rezulto de niaj malbonaj sociaj strukturoj. Hodiaŭ ni volas aŭskulti unu la aliajn, ni volas konfirmi nian solidarecon por ke ni komprenu ke ni devas agi kune kaj tuj. Mi petas vin, tial, ke vi prezentu vin al la ceteraj gefratoj, menciante vian apartan agadkampon. Fratino A, mi petas.

Fratino A: Saluton al vi ĉiuj. Mi estas Fratino A, kaj mia speciala kampo estas virinaj rajtoj. Gefratoj, granda kaŭzo de la malsanoj de nia homa socio kaj samtempe de nia ordodetrua efiko sur la biomedio estas la jarmila subpremado de virinoj. Kompreneble tio estas pli malbona en kelkaj landoj ol en aliaj, sed ĉie viroj regas kaj decidas. Viroj celas agi, agresi, dum virinoj estas pli intuiciaj, pli proksimaj al la natura mondo, pli mildaj en sia juĝado. Nur per emfazo de la virinaj kvalitoj ni havos ŝancon krei pli bonan mondon.

[Fratino A eksidas. Multaj aprobaj vortoj de la aliaj.]

Frato Z: Elkoran dankon, Fratino A. Kaj nun, Frato V, bonvolu vin prezenti al la gefratoj.

Frato V: Mi aparte kontraŭas la ekziston de miloj da nukleaj bomboj sur nia planedo. La ekzisto de tiaj murdiloj estas absurda. Ĉu oni intencas fakte *uzi* ilin? Kiel tio aspektus la vespera novaĵbulteno la postan tagon? Aŭ ĉu oni simple konstruas ilin por komplezi al la riĉuloj de la armilkompanioj? Ni scias kiom da impostpagoj de la ceteraj iras al tiuj riĉaj parazitoj. Ĉu pro tio ni toleru situacion en kiu ĉiusekunde iu idioto povus detrui la tutan planedon per premo sur butonon? Ne, ni ne povas tion

toleri – ni devas forpreni la fi-ludilojn de la registaroj!

[Frato V eksidas. Multe da aplaŭdoj.]

Frato Z: Ni absolute konsentas kun vi, Frato V. Kaj nun Fratino B, mi petas vin, ke vi parolu iom pri vi.

Fratino B: Saluton, gefratoj. Mia speciala kampo estas ekonomiko, kaj pro tio mi estas ĝismorta malamiko de la kapitalisma sistemo. Kapitalismo konvertas nin ĉiujn en egoismajn unuopulojn, kiuj avide postĉasas dolarojn kaj forgesas pri aliaj homoj. En kapitalismo ĉio havas sian prezon, sed nenio havas veran valoron. Kapitalismo instruas ke ni aplaŭdu la senskrupulojn, kiuj amasigas monon. Ĝi estas kancero en la koro de la homa socio. For kapitalismo!

[Hura!-krioj kaj aliaj aprobaj bruoj.]

Frato Z: Jes jes jes! Dankon, Fratino B. Kaj nun Frato T, estas via vico.

Frato T: Miaj karaj samideanoj kaj gefratoj, mi estas granda oponulo de la malŝpara vivmaniero en niaj landoj, antaŭ ĉio en la riĉaj landoj. Pripensu, ekzemple, kial ĉiu domo havas lavmaŝinon kaj gazontondilon kaj aŭton. Ĉu ne estus pli bone se ĉiu strato havus unu/du, kiun oni povas laŭnecese prunti? Jen nur unu ekzemplo. Ni devas uzi multege malpli de la naturrimedoj de la planedo. Ni devas lerni vivi ŝpareme kaj rezigni pri mortiga lukso.

Frato Z: Bonega pensĉeno, Frato T. Mi tutkore konsentas. Kaj nun, Fratino C, bonvolu vin prezenti.

Fratino C: Mia aparta agado celas meti finon al uzo de infanoj kiel soldatoj. Ĉiujare mortas miloj da ne plu senkulpaj junaj homoj en la servo de fi-armeoj. Krome, ni devas aboli laboron por infanoj malpli ol dekdu-jaraj. La estonteco de la mondo – se ĝi havos estontecon – dependos de sana kreskado de niaj infanoj. Militon al la milito, aparte al milito kun infanoj! Abolon al laboro farata de infanoj. Ni savu niajn infanojn!

[Sincera aplaŭdo]

Frato Z: Brave, Fratino C! Kompreneble ni ĉiuj apogas vin en tio. Kaj Frato Ŝ, estas nun via vico.

Frato Ŝ: *[Balbutas]* Mi estas a-apogant-to de la Es-spe-ranto-movado. Ni ne p-plu toler-as diskrimina-acion surb-baze de sekso, re-religio, k-kulturo, s-sed ling-gva dis-krimi-na-nacio estas tolerata. K-kaj la rez-zulto estas mal-ju-justeco, sed a-ankaŭ malŝparo da m-miliardoj por instrui la ne-efikajn na-naciajn lingvojn. Kiam ni ĉ-ĉiuj parolos fin-fine fa-acilan duan, ne-ne-neŭtralan lingvon, l-lingvon por ĉ-ĉiuj ho-omoj?

[Ĉi-foje la aplaŭdo estas pli ĝentila ol entuziasma.]

Frato Z: Bele argumentite, Frato Ŝ. Fratino Ĉ, bonvolu paroli pri via agado.



Fratino Ĉ: Mia fako estas studado de la akvorimedoj de nia planedo. Gefratoj, ni devas lerni ne nur juste distribui la akvon de nia limigita planedo, ni devas lerni ne malpurigi la riverojn, lagojn, kaj marojn. Ĉio fluas fine en niajn marojn, kaj ni iom post iom venenas la tutan oceanaron. Tio devas ĉesi!

[Laŭta aplaŭdo]

Frato Z: Jes ja, kara Fratino Ĉ! Vi absolute pravas! Kaj nun estas via vico, Fratino D.

Fratino D: Mi eksplicite kontraŭas la uzon de nukleaj centraloj por generi elektron. Tiuj centraloj estas ege riskaj por la medio, se ne paroli pri la toksaj kromproduktoj. Ĉu ne sufiĉas la ekzemploj de akcidentoj kiuj detruis la vivon de tiom da homoj? Se ni forigos nukleajn centralojn, suferos nur la banksaldoj de riĉaj konzernoj. Ili malaperu!

Frato Z: Vi parolas la veron, Fratino D. Bone farite! Kaj nun vi, Fratino E, bonvolu.

Fratino E: Ni interkonsentas ke la kapitalisma sistemo estas malhumana, sed mi aparte kontraŭas du agentojn de tiu sistemo, kiuj havas la taskon certigi ke la riĉaj landoj restu riĉaj kaj la malriĉaj landoj restu malriĉaj. Mi parolas kompreneble pri la tiel nomataj Monda Banko kaj la Internacia Mon-Fonduso. Ili estas piratoj institucioj, kiuj samtempe strebas doni respektindan vizaĝon al mondvastaj krimoj. Ili pereu!

Frato Z: Jes jes, Fratino E, ni ĉiuj plene konsentas. Dankon. Kaj nun estas via vico, Fratino F.

Fratino F: Kio ĉefe koncernas kaj konsternas min estas la koruptado de lingvo en la tiel nomata komerca mondo. Reklamoj daŭre mensogas, sed kion ni faru? Kaj nun registaroj kaj opoziciaj partioj imitas la komercajn firmaojn. Neniu scias kiam publika figuro parolas la veron kaj kiam li aŭ ŝi mensogas. La lingvo estas nia plej grava maniero interrilati, sed kiel ni uzu ĝin por konstrui pli bonan mondon, se la lingvo mem estas nefidinda ilo? Ni devas meti finon al koruptado de lingvo, kaj tio estas tasko kolose malfacila sed farenda!

Frato Z: Aj aj, Fratino F, viaj pensoj estas veraj, sed kiel efektivigi ilin? Jen granda defio!
[Solena paŭzo]
Kaj nun, gefratoj, ni pli bone konscias pri la nombro kaj dimensioj de vivminacaj danĝeroj sur nia planedo. Nun necesas scii kiel ni solvu la problemojn. Ĉiu el vi havas pretan planon, tuj efektivigotan. Ekzemple, pri nukleaj bomboj. Frato V, klarigu al la gefratoj la planon.

Frato V: Volonte. Kiel vi scias, la usona prezidento ĉiam havas atingebla sian “nigran skatolon”, en kiu estas la ŝlosilo, kiu povas aktivigi la usonajn nukleajn



bombojn. Ĉiuj ŝtatestroj de landoj kun nukleaj bomboj imitis tion, kio simpligas nian planon. Niaj komputilaj specialistoj evoluigis programon, kiu uzos tiujn ŝlosilojn por *malaktivigi* nukleajn bombojn.

Fratino A: Mirige! Ĉu tio signifas ke oni povos neŭtraligi ĉiujn nukleajn bombojn per manpleno da ŝlosiloj?

Frato V: Ekzakte, Fratino A! Sed necesas unue atingi la nigrajn skatolojn. Do, morgaŭ matene niaj tiraljoroj en multaj landoj realigos la planon.

Fratino A: Kion? Mi ne komprenas. Kiel ili efektivigos la planon?

Frato V: Bedaŭrinde ni devos mortpafi la usonan prezidenton kaj liajn gardistojn kaj forkapti la nigran skatolon. Kaj simile en Ruslando, Ĉinio, Israelo, Britio, Francio, kaj tiel plu. Estos la fino de la nuklea minaco! *[Li eksidas]*

[La ceteraj aplaŭdas, sed Fratino A. ankoraŭ skuas la kapon.]

Frato Z: Fratino A, ĉu estas problemo pri tio? Ĉu vi ne deziras ke la mondo estu libera je nukleaj bomboj?



Fratino A: Nu, kompreneble jes, sed ... *[Ŝi ne scias kiel respondi.]*

Frato Z: La solvo estas fakte pli simpla ol la problemo mem. Kaj nun, Fratino B, klarigu al ni la solvon de la problemo pri kapitalismo.

Fratino B: Refoje la solvo estas mirinde simpla, gefratoj. Morgaŭ la ĉefoficejo de ĉiu granda banko de la mondo eksplodos. La eksplodiloj pretas kaj atendas nur mian komandovorton.

Fratino A: Sed Fratino B, ĉu ne estos homoj en tiuj bankoficejoj?

Fratino B: Relative malmultaj, ni esperas, Fratino A. Malmultaj.

Frato Z: Fratino A, vi ŝajnas havi dubojn. Ĉu la krizo ne estas tiel akuta ke tuja ago estas postulata?

Fratino A: Jes, sed ĉu niaj metodoj ne devas akordi kun niaj celoj?

Frato Z: Tiaj pensoj nur paralizas agadon, Fratino! Jam jarmilojn oni prokrastis. Ni ekagos morgaŭ. Frato Ŝ, ĉu vi bonvolus klarigi al ni la solvon de la lingva problemo, de lingva imperiismo?

Frato Ŝ: Je-jes. La s-solvo estas ne tre kom-komplika. Sub ĉiu ĉ-ĉefa d-domo de la Br-British Council, de la Alli-Alliance Française, de la G-G-G-Goethe-Gesellschaft, de la R-Russkij-Jazik, kaj de la Man-Mandarena A-a-asocio atendas d-d-d-dinamito. Post kelkaj h-horoj tiuj d-d-domoj ne plu ekz-ekzistos. N-niaj ak-aktivuloj post-postlasos ĉie ver-verdan s-stelon k-kvinp-pintan. Oni kom-komprenos, ke

ve-venis la tempo de l-l-lingva egalec-eco.

Frato Z: Refoje vi aŭdis, gefratoj, ke problemo same aĝa kiel la homaro povas esti tre rapide solvita. Kaj nun, Fratino D, kion ni faru pri tiuj diablaj nukleaj centraloj?

Fratino D: Fakte, la solvo de niaj problemoj tre similas. Niaj aktivuloj ne intencas eksplodigi *ĉiujn* nukleajn centralojn, tio kreus tro grandan radioaktivecon. Do ni decidis bombi nur ĉiun *duan* centralon. Eĉ tio metos tiom da mortiga radioaktiveco en la aeron, ke oni fine komprenos, ke estis dekomence eraro konstrui ilin.

Frato Z: Brave, Fratino D, kaj humana decido. Fratino E, via solvo iom similas tiujn de la aliaj gefratoj, ĉu ne?

Fratino E: Eĉ pli simpla, Frato Z, pli simpla. Ne estas multaj oficejoj de la Monda Banko kaj de la Internacia Mon-Fonduso. Sed post dek horoj eĉ tiuj ne plu ekzistos. Bum bum! Kraŝ kraŝ! Nur kelkaj tunoj da eksplodiloj, kaj fino!

Frato Z: Admirinde, Fratino D. Fratino F, via problemo estas malpli facile solvebla. Kion via grupo planas fari?



Fratino F: Vi pravas, Frato Z, sed vidu ... post la aliaj agoj de niaj gefratoj la mondo aspektos alimaniere ol nun. Eblos, ni kredas, simple malpermesi uzadon de reklamoj. Oni rakontu nur la veron, la tutan veron, kaj nenion krom la vero. La lingvo estos pura ilo por krei pli bonan mondon.

Frato Z: Vidu, gefratoj, kio eblos se nur ni kunlaboros! Kaj vi, Fratino Ĉ, kiel vi intencas solvi la problemojn de akvomalpurigado?

Fratino Ĉ: Gefratoj, la insulo Singapuro donis al ni bonan ekzemplon. En Singapuro, se vi faligas rubaĵon sur la straton kaj ne levas ĝin kaj metas en rubujon, vi devas surloke pagi monpunon. Nu, ni sekvos tiun ekzemplon: ĉiu, kiu malpurigas akvon, devos tuj pagi mil-dolaran monpunon. Se tiu sama homo ofendos duan fojon, li aŭ ŝi estos mortpafita. Baldaŭ niaj akvoj estos puraj, ĉu ne?

[Ĉiuj krom Fratino A aplaŭdas]

Frato Z: Alia pruvo, gefratoj, de la efikeco de simplaj rimedoj. Simpla estas bela. Estas nun via vico, Frato T. Kiel vi intencas solvi la problemon de nia malŝpara vivmaniero?

Frato T: Mi ĝojas ke nia plano mortigos neniun, almenaŭ ne intence. Ni simple faros serion da reguloj, ekzemple, en ĉiu strato kun dek domoj estu ne pli ol du gazon-tondomaŝinoj, ne pli ol du lavomaŝinoj, ne pli ol du aŭtoj. Poste ni pripensas limigi la nombron da litotukoj kaj vestoj ĝenerale, sed ni komencos tre milde.

Frato Z: Eminente saĝa politiko, kara Frato T. Kaj kiu restas? Jes, estas vi, Fratino C.

Fratino C: Ni strebas elimini uzadon de infansoldatoj kaj infanaj sklavoj en laborejoj. La plej efika solvo estos malpermesi generadon dum tuta generacio de infanoj. Do, deviga steriligo de viroj inter 16 kaj 60 jaroj en ĉiuj landoj, kie tiuj grandaj krimoj ekzistas. Se ne plu estos infanoj, oni ne plu povos kruele trakti infanojn.

Frato Z: *[iom paŭzas]* Gefratoj, vi aŭdis tiom da geniaj ideoj ĉi-kunside. Morgaŭ ekos niaj planoj por savi la mondon. Ege domaĝe ke oni ne entreprenis ion similan antaŭ mil jaroj. Eble estas jam tro malfrue por savi nian planedon. Sed ni provu! Morgaŭ! Ek al savo de la mondo!

[Ĉiuj krom Fratino A entuziasmege aplaŭdas, kaj ĉiuj komencas iri jubilante al la pordo. La kunsido evidente finiĝis. La ceteraj ne konstatas la dubojn de Fratino A.]

Fratino A: Savi la mondon? Tiel? Ho, preĝu por ni! *[Ankaŭ ŝi eliras.]*



La Filmkonkurso

Ekde la 1-a de marto la tre atendita Esperanto-Filmkonkurso komenciĝis. La ideo estas simpla. Profesiaj aŭ diletantaj filmreĝisoroj, aŭ aktoroj, povas partopreni en filmkonkurso por ŝanco gajni monan premion de $500.

Ĉiuj detaloj troviĝas ĉe www.thekonkurso.com. Tamen, la projekto ne povas realiĝi sen la helpo de diversaj grupoj. Ni bezonas la helpon de volontaj spertaj esperantistoj, reĝisoroj kaj, ĉar plej multaj aktoroj en Aŭstralio ne regas Esperanton, kaj por helpi ilin krei iliajn filmetojn, ni devas trovi tradukantojn kaj konsilantojn.

La konkurso estas nun preskaŭ je la fino. Tamen ne estas tro malfrue por partopreni. Ĉiuj el vi povas helpi nin propagandi pri la konkurso. Kaj se vi povas eĉ iomete, ne hezitu! Kontaktu nin ĉe informado@esperanto.org.au.

Longe vivu Esperanto!

Riĉardo

Direktoro de Informado de AEA

Malsupre: *Richard Delamore en venonta nova filmo "Inevitable" verkita kaj kontrolita de Nicolas Ralph.*



Ĉiuj volas lerni!

Vicky Crickett

Montessori@Bellevue School en Tauranga, Nov-Zelando, nun proponas Esperanto-kurson por siaj studantoj.

La Montessori-a lernejo, por infanoj kiuj aĝas 6 ĝis 11, volis proponi pliajn lernobjektojn al siaj lernantoj. Ĝis nun la infanoj ne lernis aliajn lingvojn en la lernejo sed la gepatroj kaj instruistoj rekonas ke la lernado de fremdaj lingvoj donas al la infanoj avantaĝojn. La lerneja estraro jam sciis ke mi instruas Esperanton al miaj infanoj hejme kaj ni interkonsentis ke mi instruu al eta grupo ĉe la lernejo.

La plej multaj studantoj kaj instruistoj neniam aŭdis pri Esperanto. Tial, unue mi vizitis la lernejon kaj prelegis pri la lingvo. Mi parolis pri la logikeco de la lingvo kaj montris ekzemplojn de vort-konstruado. La infanoj komprenis rapide kio estas la vorto por 'malgranda' kiam mi diris 'granda' kaj klarigis la 'mal' prefikson.

Tiam ni kune spektis la unuan lecionon de 'Mazi en Gondolando'. Mi tre ĝoje spektis la infanojn. Ili ŝatis la programon kaj estis tre absorbitaj. Ili ridis, divenis la signifojn de la vortoj kiujn ili aŭdis, kaj ekparolis kiam la vortoj aperis sur la ekrano. Mi ne devis instigi ilin; estis tute nature.

Poste, la instruisto demandis al la infanoj 'kiu volas lerni Esperanton?' kaj ĉiuj infanoj tre entuziasme levis la manon! Tamen, ni decidis komence havi nur kvin personojn en klaso de infanoj de miksitaj aĝoj.

Mi ne estas instruisto (mi

Everyone wants to learn!

Vicky Crickett

Montessori@Bellevue School in Tauranga, New Zealand, is now offering an Esperanto course for its students.

The Montessori school for children aged 6 to 11 wanted to offer additional subjects to its pupils. Up to now the children haven't learnt another language at school but both parents and teachers recognise that learning a foreign language has advantages for the children. The school board already knew that I was teaching Esperanto to my children at home and we agreed that I should teach a small group at the school.

Most of the children and teachers had never heard of Esperanto so first I went to the school to do a presentation about Esperanto. I spoke about the logic of Esperanto and gave examples of word building. The children quickly understood what was the word for 'small' when I said 'big' and explained the 'mal' prefix and so on.

Then we watched together the first lesson of Mazi en Gondolando. I enjoyed watching the children. They liked the programme and were very engaged; they laughed, guessed the words that they heard, and spoke out when words appeared on the screen. I didn't have to prompt them; it was just natural.

Afterwards, the teacher asked who would like to learn Esperanto and all the children put up their hands! Nevertheless, we decided to start with only 5 children in a mixed-age class.

I am not a teacher (I'm a computer professional) so I was a little worried about teaching. Fortunately, I

estas komputilisto), do mi iomete timis pri instruado. Feliĉe, mi havas la tre utilan kaj taŭgan kurson de Penny Vos “Talking to the Whole Wide World“. Tiu estas kurso por instrui Esperanton al infanoj por instruistoj kiuj ne parolas Esperanton. La kurso estas ankaŭ perfekta por esperantistoj kiuj neniam instruis en lernejo! Ĝi estas bona gvidlibro kaj enhavas multajn ludojn por amuza lernado.

Ĝis nun mi faris kvin lecionojn kaj mi kredas ke la lernantoj ĝoje akiras novan lerton. Ŝajne la studantoj parolas ekscite pri Esperanto hejme kaj kelkaj el la aliaj infanoj jam demandis al mi kiam ili mem rajtas lerni. Mia filo (kiu jam parolas iom da Esperanto) ankaŭ helpas instrui en la klaso ĉar liaj klasanoj volas lerni.

Tio estas laŭ la metodaro de Montessori: studantoj elektas taskon kiun ili trovas interesa kaj ili instruas sin mem, kiom eble. Ofte pli aĝaj klasanoj ankaŭ helpas ilin se necese.

Mi esperas ke, kvankam mi nur instruas kvin infanojn nun, mi povas helpi ilin lerni por si mem, kaj poste ili povas helpi aliajn en la klaso. Mi kredas ke Esperanto estas tre taŭga lingvo por lerni tiumaniere, kaj tre taŭga por Montessori-lernejoj. Kaj tiam, ĉiuj infanoj kiuj volas povas lerni!

have the very useful and relevant course by Penny Vos “Talking to the Whole Wide World”. It is a course to teach Esperanto to children for teachers who don’t speak Esperanto. It is also perfect for Esperantists who haven’t ever taught in school! It is a good guide book and has lots of games for fun learning.

Up to now I’ve taken five lessons and I think that the students are enjoying acquiring a new skill. Apparently, the participants talk excitedly about Esperanto at home and many of the other children have asked me when they can learn. My son (who already speaks some Esperanto) has also been helping teach in the class as his classmates want to learn.

This is along the lines of the Montessori methods: the students choose work that interests them and teach themselves where possible. Often older classmates will help if needed.

I hope that, even though I am only teaching five children now, I can help them learn for themselves and then they can help others in the class. I believe that Esperanto is a very good language to learn in this way, and very suitable for Montessori schools. And then every child who wants can learn!



Maldekstre al dekstre estas: Stanley Wells, Quinn Crickett, Kate Millar, Vicky Crickett, Preston Sykes kaj Connor Cambourn. Neaperas Matthew Owen.

Left to right are: Stanley Wells, Quinn Crickett, Kate Millar, Vicky Crickett, Preston Sykes & Connor Cambourn. Absent is Matthew Owen.

Libroj, E-arĥivoj, kaj Kolektoj

Katja Steele

Preparante la pasintjaran jubilean kongreson de AEA, necesis havi sciojn pri la komencoj de la movado en Aŭstralio kaj koni datojn, nomojn ktp. Tamen, ni ja festis 100 jarojn da ekzisto kaj tio signifas ankaŭ 100 jarojn da klopodoj, organizado, kluba agado, baraktado, sukcesoj, ideoj, opinioj, presitaj verkoj ktp. Kie trovi la serĉatajn informojn?

En libroj

Mi konas tri fontojn: Charles Stevenson verkis 11-paĝan historion pri la komencoj de la movado: *Onward Flows the Stream. Towards a History of Esperanto in South Australia*. Laŭ mia scio ĝi nenie plu haveblas. La relative bone konata *Esperanto en Aŭstralio (1905 – 1985 Historio de AEA)* de Ray Ross (Brisbano 1985, eldono de AEA) enhavas multajn, ege koncizajn faktajn informojn, same kiel ĝia daŭrigo *Historio de Esperanto en Aŭstralio 1985-2005* verkita de Terry Manley (2005, AEA).

En aŭstraliaj "E-arĥivoj"

Mi mem vizitis unu tian en Melburno. Ĝi estas fakte ordinara deponejo. En unu el ĝiaj ejoj estas kartonaj skatoloj kaj plastaj sakoj kun plej diversaj esperantaĵoj de fotoalbumo ĝis kolektoj de revuoj. Ili estas tie stokitaj unu sur alia ĝis alto de proksimume du metroj en malgranda spaco. Marcel Lereveld diris ke ankaŭ lia grupo havas arĥivaĵojn. Ĉu ankaŭ Brisbano, Perto, ktp. havas etajn kolektojn de konservendaj materialoj?

En personaj kolektoj

La sola infano de meritplenaj esperantistoj Tim kaj Idis Einihovici, Laura, kiu loĝas en Perto, havas belan, eĉ ordigitan kolekton de Esperanto-memoraĵoj pri siaj gepatroj. Ĉu la familio de Ralph Harry havas ankoraŭ iujn esperantaĵojn? Verŝajne eblus trovi la posteulojn de almenaŭ kelkaj niaj pioniroj, ekzemple John Booth, George Collingridge, kaj certe iujn de la familio de Ray Ross, ges-roj Ellyard, Ivan Maddern, Paul Schwerin ktp. Sed, kien meti la akiritajn memoraĵojn?

En E-revuoj

Mi mem multon eksciis pri la pasinto de nia movado el la kolekto de kelkaj E-revuoj de Aŭstralio, ricevitaj sur kompakta disko el la persona kolekto de Don Broadribb. Kiu alia havas tian kolekton?

En ne-esperanta literaturo

Ekzemplo povas esti Adelajdo. En ĝia tagĵurnalo *The Advertiser* aperis multaj priesperantaj artikoloj jam antaŭ la unua kongreso (1911). Prepare al la jubilea kongreso tiu ĉi fonto de informoj estis vere signifa.

Ni povus serĉi ankaŭ eksterlande, en E-revuoj de aliaj landoj, en la kolektoj de alilandaj esperantistoj aŭ en la jam establitaj, profesiaj E-arĥivoj. Sube vi trovas la adresojn de du tiaj. Mi persone vizitis kaj envie admiris ilin ambaŭ.

Ni, la preparantoj de la jubilea kongreso, kontaktis la Vienan muzeon por konsulti ĝian gvidanton rilate la E-ekspozicion en Adelajdo kaj unufoje jare ni sendas al ambaŭ institucioj pakaĵeton kun arĥivendaj aĵoj, ekzemple la revuo *Tamen Plu*, fotoj pri la jubilea kongreso, diversaj E-presaĵoj, kompakt-diska filmo pri la E-ekspozicio ktp.

Sendi ion Eŭropen por ne perdi ĝin – iom stranga solvo. Multe pli bone kaj konvene estus havi E-kolekton ĉi tie, en Aŭstralio.

Pripensinte la temon, diskutinte ĝin kun kelkaj interesatoj, konsultinte kelkajn alilandajn arĥiv-manierojn, mi proponas la jenajn paŝojn:

1. Fondi societon kun celo zorgi pri la arĥivaj E- materialoj de Aŭstralio

2. Difini ĝiajn celojn: zorgo pri la konservado kaj ebligo de uzo; fina celo estu atingi ŝtate protektatan Statuson

3. Trovi reprezentantojn en ĉiuj regionoj de Aŭstralio por ke ili helpu trovi arĥivajn materialojn ĉe familioj de esperantistoj kaj simile

4. Havi provizoran lokon por kolekti la materialojn: ekzemple la E-domo en Sidnejo. Serĉi aliajn solvojn

5. AEA garantiu ĉiujaran sumon por arĥivaj laboroj (ekz. Laborkunvenoj por komputile prilabori kolektitaĵojn ktp)

6. Starigi monkolektan kampanjon, UEA-konton, verki artikolojn por Aŭstralio (ankaŭ anglalingvajn) kaj por eksterlando

7. Krei retpaĝaron pri la kolekto

8. Respondeculo informiĝu pri eblaj ŝtataj (kaj Esperantaj) subvencioj

9. Anonci peton pri heredigo de materialoj kaj mono

10. Konstante aperigi informojn pri la evoluo de la projekto

11. La societo aparte zorgu pri la disvastigo de la kulturaj atingoj de la Aŭstralia E-movado (personecoj, verkistoj, gravaj tradukoj el kaj en aliaj lingvoj ktp)

12. La societo iniciatu festojn, ekspoziciojn, simpoziojn kaj simile.

Profesiaj E-arĥivoj

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (por C. Gacond)
Bibliotheque de la Ville
C.P.3034
CH-2303 La Chaux-de-Fonds
Svislando

Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
Pf. 308
AT-1015 Wien
Aŭstrio
www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo;
Direktoro: Herbert Mayer
esperanto@onb.ac.at
Funkcias elektronika katalogo, Trovanto, atingebla tra la menciita hejmpaĝo, kun Esperanto kiel serĉlingvo.

Bildo: *Zamenhof-Festo, 1954, Adelajdo*



Arthur Oliver Centjara

Trevor Steele

Antaŭ multaj monatoj venis peto de juna slovaka esperantisto loĝanta en Anglio, Martin Miniĥ. Martin kaj aliaj junaj esperantistoj volis fari ekskurson al la iama sidejo de IEL (ekde 1936) kaj de UEA (de 1947 ĝis 1955) en Heronsgate. Heronsgate estas parto de la vilaĝo Chorleywood, nordkcidente de Londono. Martin rakontis ke la grupo faris “pilgrimadon” tien sed ne trovis la lokon.


Poste ili trovis artikolon en la revuo *Esperanto*¸ verkitan de konata angla esperantisto Johano Rapley, kiu donis “multaj informojn” pri la sidejo sed ne sufiĉajn ke la junuloj trovu la ekzaktan lokon. Bedaŭrinde, s-ro Rapley intertempe mortis, do ne eblis demandi lin. Pluaj esploroj indikis ke en 1936 iu s-ro Dinslage donacis la domon en Heronsgate al Cecil (“Tajni”) Goldsmith por la uzo de la Esperanto-movado. Kiam Tajni iĝis la ĝenerala sekretario de IEL, la domo iĝis la centralo de tiu organizo dum la terura Dua Mondmilito.

Tajni Goldsmith havis filinon Eileen (naskita en 1918) kiu edziniĝis al Arthur Oliver. Kune Eileen kaj Arthur fondis la eldonejon *Esperanto Publishing Company.* Ges-roj Oliver migris al Aŭstralio kaj kunportis sian kompanion. Certe ges-roj Oliver, se ankoraŭ vivantaj, povus diri kie troviĝas la serĉata domo. Martin skribis al Katja Steele, kiu devenas el Slovakio, kaj petis helpon trovi la maljunan paron.

Pere de Vera Payne, loĝanta en Perto, Katja eksciis, ke jes, la ges-roj ankoraŭ vivas en Okcidenta Aŭstralio, kaj ŝi transdonis la telefonnumeron. Trevor parolis telefone kun Arthur, kaj la maljunulo povis doni klarajn instrukciojn kiel trovi Heronsgate.

Arthur Oliver iĝis 100-jara la 8-an de majo 2012 (li ankoraŭ veturigas aŭton). Dum multaj jaroj li kaj Eileen ne okupiĝas pri Esperanto, sed iliaj meritoj estas grandaj. Kiam Trevor diris ke li ŝatus “fari bruon” pri la centjarulo (kiom da esperantistoj jam atingis tiun aĝon?), Arthur ne entuziasmis. Tamen ni, Katja kaj Trevor, kredas ke ni esperantistoj devas iel honori homojn, kiuj pluportis la torĉon de nia movado en tre malfacilaj jaroj, kiam la mondo disŝiriĝadis pro milito, kaj poste unusence eĉ pli malfacilaj jaroj por Esperanto, kiam la angla lingvo komencis superondumi la mondon.
Ni gratulu Arthur Oliver okaze de lia centa datreveno!

Bildo: *Unu el la multaj valoraj eldonaĵoj de la Esperanto Publishing Company*


FUNDAMENTA
KRESTOMATIO
DE LA LINGVO
ESPERANTO
DE
D-ro L. L. ZAMENHOF
17a ELDONO 1954
(FOTO-REPRESO 1956)
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED
RICKMANSWORTH, ANGLUJO

Vizito al la ruinoj de Salakva Rivero (Saltwater River),Tasmanio

Kam Lee



Bildo 1: *Ruinoj de Salakva Rivero. La relative rapida degenerado de la grejsaj konstruaĵoj estas pro la fakto ke marakvo estis uzata por fari la morteron.*

Mi vizitis Salakvan Riveron kun membroj de la Esperanto-klubo de la Universitato de Tasmanio. La ruino de ĉi tiu eksa punkolonia situas en la Tasmania Duoninsulo kaj havas du partojn: ekskarbminejo kaj forlasita historia ejo por krimuloj sub kontrolata libereco.

La famaĉa karbminejo situas je proksimume 1 km de la marbordo kaj havis la reputacion de “infero en la tero”. La unua ĉefa ŝakto estis konstruita en 1842. Estis du ĉefaj ŝaktoj, kiuj penetris la teron ĝis 40 kaj 50 metroj.

La “timegigaj karbminejoj” estas priskribitaj en la fama libro “Por la periodo de lia natura vivo” de Marcus Clarke. Laboro en la minejo estis metodo de puno kaj la laborkondiĉoj en la minejo estis tre teruraj. Clark mencias ke, pro la fakto ke Salakva Rivero estas la plej norda parto de flagsignala sistemo, li konkludas ke la loko estas preskaŭ neeskapebla (raportoj pri eskapoj povis esti rapide senditaj per flagsignaloj de Salakva Rivero al Hobarto).

Dum maksimuma produktado, 500 tunoj da karbo jare estis senditaj al Hobarto. Vapormotoro lokiĝis je la rando de la ŝakto kaj ĝi tiradis karbon kaj akvon el la minejo. Tia maŝino estis la unua mekanika ilo uzita en karbminejo en Aŭstralio. Produktado finiĝis en 1848. Poste okazis produktado per privata kompanio sed en 1867 elĉerpiĝis la karbo kaj la minejo estis fermita.

Bildo 2: *Alia vido de la ruinoj. La tegmentoj malaperis kaj restas nun nur la muroj faritaj el grejso. En la fono kaj norden oni povas vidi Norfolk-Golfon kaj Forestier-Duoninsulon.*



La kolonio estis unu el la fruaj ejoj por kontrolata libereco en la Tasmania Duoninsulo. La ĉirkaŭa grundo estis fekunda, kaj oni kultivis tie tritikon, terpomojn, rapojn, brasikojn, fojnon kaj simile.

Tri specoj de kondamnitoj estis enkarcerigitaj tie. Tiuj de la plej malalta tria klaso ĉefe faris punlaboron. La periodo de kontrolata libereco plilongiĝis se ili malbone agis. Tamen, oni povis pasi al la dua aŭ unua klaso pro bona agado. Inverse, oni povis pasi al la dua aŭ tria klaso pro malbona agado.

La kondamnitoj de la unua klaso povis labori kiel kuiristoj, bakistoj, pordgardistoj, komizoj kaj tiel plu. Konforma konduto rezultis en ricevo de speciala bileto (“bileto de forpermeso”) kiu rajtigis tiajn kondamnitojn al pagita laboro, se ilia kondamno estis jam duonfinita.

La maksimuma nombro de kondamnitoj en tiu loko estis 587 (en 1846). Post 1851, kripluloj kaj frenezuloj estis senditaj tien. En 1856 la punkolonio fermiĝis. La sendado de kondamnitoj el Anglujo al Aŭstralio finiĝis en 1868. Preskaŭ 69 000 kondamnitoj estis senditaj al Tasmanio inter 1788 kaj 1868. Ili estis plejmulte ŝtelistoj aŭ poŝoŝtelistoj, kiuj ofte agis krimule pro la troa loĝantaro kaj senlaboreco en Anglujo. Notindas ke en 1840 4 105 el la 19 292 homoj kiuj estis kondamnitaj en Anglujo estis senditaj eksterlanden.

La konstruaĵoj estis faritaj el aŭ grejso aŭ argila briko. Tiuj faritaj el grejso estas sufiĉe bone konservitaj, sed ili ne plu havas tegementojn. Ni rigardis la ĉambretojn kiuj estis uzitaj por izola enfermo de tre malbonaj kondamnitoj. Tiaj karceroj estis malgrandaj kaj havis dikajn grejsajn murojn.



Bildo 3: *Esperantistoj sur la ruinoj. Certe estis ĝoja ekskurso. Maldekstre al dekstre: Kam kun Angie, Marko, kaj Molly kiuj estas studentoj ĉe la Universitato de Tasmanio kaj ofte ĉeestas kunvenojn de la universita Esperanto-klubo. Ili informiĝis pri la klubo per la Esperanto-budo ĉe la universitato.*

Bildo 4: *Fefabela maniero de piedirado sur la ruinoj. Eble ili rolas kiel malliberuloj en historia eskapo!*



La konstruaĵoj faritaj el argila briko estas signife detruitaj pro venta erozio kaj pluvo. La argilaj brikoj kaj la mortero ne estis sufiĉe fortaj por konstruado ĉar ili estis erare faritaj per marakvo kiu havas altan salenhavon. Inter la ruinoj estas kelkaj ŝildoj kiuj priskribas la historion de tiu loko. Post serioza analizo, ni esploris kaj piediris tra la restaĵoj. Menciinda estas la bela marborda fono.

Dum nia vizito ni renkontis preskaŭ neniun, sed de tempo al tempo kelkaj vizitantoj alvenis kaj foriris. Kontraste, kaj iom strange, samtempe miloj da homoj vizitis la Marhavenon de Arturo (Port Arthur) kiu situas je nur 30 kilometroj sudoriente en la alia flanko de la duoninsulo.

Bildo: *La balalajka grupo konsistas maldekstre al dekstre el Ally Hauptmann-Gurski (basbalalajko), Dieter Hauptmann (prima balalajko) kaj Bob Felby (prima balalajko).*



Kongresa balalajka koncerto

Bob Felby kaj Kam Lee

En la vespero de la 14 de julio 2011 okazis balalajka koncerto.

Balalajko estas tri-korda muzikilo, kun triangula korpo kaj frethavanta kolo. La muzikilo estas farita el ligno kaj oni ludas ĝin per fingroplukado de la kordoj, kiuj antaŭe ĝenerale estis faritaj el viscero sed nun el nilono. La balalajko originas el Rusio kaj estas unue menciita en la rusa literaturo en 1688.

La ĉefparto de la programo konsistis de:

1) Palyanka: verkita kaj ludita sole de Dieter Hauptmann
2) Hutsulka/Kasbek: kombinaĵo de du melodioj
3) Miksmelodio

a) Boatmaristoj de la Volga
b) Kozakoj dum patrolado
c) Moskvaj Noktoj

Speciala okazo en la mezo de la koncerto estis ludado kun speciala gasto JoMo de la kanto “Kalinka” verkita de JoMo.

Unu el la kulminoj de la koncerto estis ludado de la “Sabra Dancado”, mondkonate klasika verko de Aram Khachaturian el Armenio.

La koncerto estis grandega sukceso kaj la ĝoja aŭdantaro donis grandegan aplaŭdon.

Memorindaj momentoj el la ferma ceremonio kaj bankedo de la jubilea kongreso

Katja Steele kaj Kam Lee

La ferma ceremonio kaj bankedo okazis sabaton la 16-an de julio 2011 ĉe la Universitato de Adelajdo. Je la komenco Roger Springer sperte ludis la sakŝalmon.

Dum la vespermanĝo okazis prelega parolado de Katja Steele. Je la fino okazis la prezentado de Esperanta Kuko, kiu estis bongusta ĉokolada kuko kun fragoj. Menciinda estas la disdono de la Zamenhof-biskvitoj, kiuj montris bildon de Zamenhof kaj la flagon de Aŭstralio.

Je la fino, Alan Bishop ludis la elektrikan pianon, dum feliĉaj esperantistoj melodie kantis.

En sia prelego Katja esprimis dankojn al:

- Universitato de Adelajdo kiu sponsoris nin per senpaga uzado de ejoj je la valoro de 18 000 dolaroj.
- dizajna firmao PARALLAX, kiu donacis al ni Esperanto-ekspozicion je la valoro de proksimume 13 000 dolaroj kaj kies dizajnistino pretis fari apartan afiŝaron el la nedefinitiva materialo speciale por nia kongreso.
- nia germana amiko, Hermann Kroppenberg, kiu donacis al ni Zamenhof-kuketojn.

Estas la espero de la LKK (Katja, Trevor, Sandor kaj Indrani) ke ne multis la prigrumblindaĵoj kaj ke la pozitivaj spertoj estos tiuj, kiujn ni ĉiuj longe memoros.

Bildoj: *Partoprenantoj de la bankedo*









Happy 125th Anniversary, Esperanto!

Crystal Hill
esperanto125.au@gmail.com

I'm sure you have already heard that it is the 125th anniversary of Esperanto! It's been 125 years since the first book in Esperanto was published and Esperantists around the world are celebrating this momentous occasion. AEA is also celebrating this occasion and invited people around Australia to learn Esperanto for 125 days via free online courses at http://lernu.net.

We sent invitations to numerous universities and embassies as well as to AEA members containing a promise: if you study Esperanto 15 minutes a day for 125 days from 23 March to 26 July (Esperanto Day) you will be able to speak Esperanto. People were invited to do the courses completely on their own or with the assistance of AEA, and I am proud to say that over 40 people signed up to learn with us and things are going well. If you would also like to learn or improve your Esperanto, it's never too late! Visit http://lernu.net today and enjoy learning using their interactive courses, games, dictionaries, music, books and more. Best of all, it's free!



Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono

Vidu gresillon.org por detaloj pri novaj programoj ĉe la Esperanto-kastelo en Francio. La somera programo havas 4 laŭtemajn semajnojn:

julio 21-28: Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj.

julio 28 – aŭgusto 04: Alternativa semajno kun verd-politika seminario kaj E-kursoj por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj.

aŭgusto 04-11: Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze.

aŭgusto 11-20: Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj, farado de manpupoj, kaj vesperaj spektakloj, muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj.

Petas korespondamikon

S-ro Michael Holland, 90/328 Fullarton Road, Fullarton, SA 5063 deziras korespondamikon por diskuti skribadon kaj ekzercadon.

Kongresoj

Aŭstralia Esperanto-Asocio

Dato: 28-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro (aŭ la 2-a se vi volas tagon por viziti la belan urbegon, Brisbane).

Kongresejo: la Eduka Fako de Griffith University ĉe Mt Gravatt. La jarkunsido okazos ĉe la State Library of Queensland, South Bank - 2a E (proksime al piedponto).

Loĝejo: Hotel George Williams, 317-325 George St, Brisbane. Ciuj ĉambroj estas puraj kaj komfortaj kaj havas banĉambron kaj eblecon fari teon. Bonvolu skribi al ni antaŭ la fino de junio por informi ĉu vi volas dividi 2-litan ĉambron aŭ mendi du-personan aŭ unu-personan ĉambron, kaj ĉu vi volas resti 3 aŭ 4 noktojn. Poste ni informos vin pri la kosto de la ĉambro kaj la kongresa programo.

Kay Anderson, Sekretario de la Brisbana Esperanto-Societo
Telefono: 07 3848 4428
Retpoŝto: kjand@ozemail.com.au



Bildo: *Brisbana Urbdomo.*

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

La venonta kongreso de NZEA okazos en Auckland ekde la 10-a ĝis la 16-a de januaro 2013 ĉe la St Francis Retreat Centre kie okazis la Oceania Kongreso en 2008. En Auckland ne okazas tertremoj!

NZEA venigos spertan eksterlandan esperantiston por instrui, gvidi sesiojn, kaj prelegi dum la kongreso. Pliaj detaloj aperos poste.

Bildo: *Auckland, kongresurbo de la venontjara kongreso de NZEA*



Universala Kongreso 2012

La 97a Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio okazos en Hanojo, Vjetnamio ekde 28-a de Julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012

Kongresaj agadoj estas interkona vespero, solena inaŭguro, ekumena diservo, paroligaj kursoj, bankedo, balo, koncerto, KER-ekzamenoj, kunveno de la Societo Zamenhof, teatro, esperantologia konferenco, belartaj konkursoj, faka forumo, aŭkcio, internacia arta vespero, solena fermo kaj aliaj.

Prelegoj dum la Internacia kongresa universitato:

Jonathan Cooper (Aŭstralio): *Moderna arto*;
Mark Fettes (Kanado): *Lernejo kaj naturo en ekologia krizo*;
Laŭlum (Ĉinio): *Lingvo, kulturo, literaturo*;
Stefan MacGill (Hungario): *Vortŝercado en Esperanto*;
Gábor Márkus (Hungario): *Kiu kontrolas la registarojn?*;
Francesco Maurelli (Britio): *Subakva robotiko*;
Jukka Pietläinen (Finnlando): *Novaĵoj translimen*;
Trevor Steele (Aŭstralio): *Malapero de la tasmaniaj aborigenoj*;
Humphrey Tonkin (Usono): *Esperanto-poezio*.

Antaŭkongresaj ekskursoj:
Ninh-binh Provinco kaj Hoa Lu

Dumkongresaj tutagaj ekskursoj:
1) Halong-golfeto,
2) Vilaĝoj de manartaĵaj
3) Ninh Binh-regiono,
4) Mai Chau-tribo
5) Parfuma Pagodo.

Postkongresaj ekskursoj:
1) Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Kamboĝo
2) Centra/suda Vjetnamio kaj Angkor Wat.

Aldona informo ĉe http://www.uea.org/kongresoj/index.html

(La Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazos en Hanojo ekde la 5-a ĝis la 11-a de aŭgusto, 2012.
La kongresejo estas la oficejo de la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj.
Pli da informo ĉe http://ijk-68.hanojo.org/)

Bildo: *Thap Ruà*



Bildo: *Hanoja urbhorizontalo*



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President
Bradley.m@woosh.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
chris.krageloh@gmail.com

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Vicky Crickett | Committee Member
vcrickett@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
www.oceana-esperanto.weebly.com
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Suzanne Corry | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Crystal Hill | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Richard Delamore | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Yaw Ampomah Badu | Director of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.


ESPERANTO











